

& Moderna anĝeluso:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 455 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<: 4;4;4;4; > (

/LA LATI Do DoRe Mi MiFa Mi Do; La LaTi do doTi La LaSo Mi i; La LaTi do doTi La LaSo Mi Do; Re ReFa Mi ReRe Do TITI LA A;

(#Rekantaĵe: LA LATI Do Re Mi MiFa Mi Do; La LaTi do Ti La LaSo Mi i; La LaTi do Ti La LaSo Mi Do; Re ReFa Mi Re Do TITI LA LA A;)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 / Meze de l' polvo kaj bruo de l' vivo ; Haltu medite, pasanto, ĉar ĵus ; Venis la horo de l' aperitivo.. ; Aŭdu! Sonoras por vi l' anĝelus' ..

(×:; **Sur mia lango rulas la vortoj ; En mia sango lulas la mort' ; Gutojn ĉu ŝvitas, glutojn meritas ; Sur mia lango rulas la vortoj.)**

'2 Tintas kristale invito de l' glasoj, ; Loge aromas parfum de l' aniz', ; Vidu, sur ĉiuj trinkejaj terasoj ; Kuŝas peceto da ter-paradiz'.

'3 Frato, sidiĝu kaj mendu serene ; Noblan trinkaĵon laŭ saĝa prefer', ; Ĝuu la tagon, – kaj danke-komprene ; Havu rideton por via kelner'!

'4 Ŝvebu tra spacoj al monda ekstremo ; Sur la velura flugil' de l' forges', – ; Lasu aliajn ĉe kafo kun kremo ; Ŝimi en ombro de nigra cipres'.

'5 Meze de lumo reala aŭ reva ; Inter bonhomoj vi estu bonhom' ; Kaj vi facile pardonos al Eva, ; Ke – bedaŭrinde – ŝi manĝis de l' pom'*.

'6 Kion signifos nun burĝaj mizeroj? ; Kion fakturo de via tajlor'? ; Velkas la rozoj.. paligos ciferoj.. ; Oron valoras nur ora humor'!

'7 Tiam pli alten komprena kompato ; Portos la koron ĝis Ĝojo de l' Viv': ; "Pacon sur tero al ĉiu homfrato! ; ..Venis la horo de l' aperitiv'.."